N-ro 2

S"EVILA FANZIN

VERKITA EN LA PLEJ BONGUSTA LANGVO. JES, LANGVO!

# TAŬRLUKTEJO DE SEVILJO




Sub la moŝtero ne malpereigos per de la renomide Sevilla famaj taŭrluktistoj.

ta helpas, spado 6 ta brutaro kun emblemo verda kaj ruĝa, la permeso kaj se la vepikos, banderilos kaj ELEKTITAJN TAŬROJN 6 de D. EDUARDO MIURA

SPADULOJ:

MANUEL' BENÍTEZ — LAKORDOVANO

MANUEL' RODRÍGUEZ — MANOLETE

LA KNABO DE TRIANO — ZAMENHOF



N-ro 2 · Aprilo-1985.



Eldonas:
SEJO Pozo, 3
41003 - SEVILLA
(Hispanio)

## Ĉefkunordiganto

Francisco Pérez Cruces



## Kunlaborantoj



Alberto Franco Ramírez



Antonio Rodríguez Gasch.



Juan de Dios Montoto Sarriá.

KAJ...

- ŜTELULO, PARDONU STELULO, REAGAN
- KOLEKTIVO MI.
- OFENSIVO ĈIESREVUINO
- LA BUFO "KIU FLUGAS".
- SATURIO ALONSO "AFIŜOJ POR LA "O"




Denove ĉi tiu aro de paperaĉoj krampitaj kaj fotokopiitaj (tiel nomis nian revuon iu neproksima samideano) alvenas ĉe vi, ĉifoje kun multe pli da enhavo, paĝoj, desegnoj, ktp. Finfine oni aranĝis la internajn problemojn, kaj la revuon eldonas kaj pagas S.E.J.O. Bedaŭrinde ankoraŭ ekzistas junuloj pli aĝaj anime ol ili aspektas. Alie, ni volas informi al vi pri kelkaj novaĵoj. Unue, se la revuo atingas vin antaŭ la Sankta Semajno, ĉeestu la 9an Renkontiĝon de HEJS en Malago (Trinidad Grund, 28) de la 6a ĝis la 9a de Aprilo. La unuan tagon okazos kunveno de Andaluzia Esperanto Unuiĝo. Somere okazos en Seviljo la 3a Andaluzia Kongreso de Esperanto sub la temo Esperanto kaj Komputiko. Samideano M. Angel Sancho estros kurson intensiven pri lingvaĵo "BASIC", kaj ankaŭ okazos seminarioj pri la temo. Paralele, la kongreso signifos la konsolidiĝon de A.E.U. kiel esperantista forto. **Petu aliĝilojn** de LKK en str. Pozo, 3 41003-SEVILLA.

La Universala Kongreso okazos en Aŭgsburgo kiel sciite. Kelkaj seviljaj samideanoj pensas iri tien. Se vi samintencas parolu kun ili (ankoraŭ ne decidis ĉu iri al tiu urbo aŭ al la IJK en Schlos Eringerfeld).

Fina averto. Kiam vi legos ĉi revuon, transdonu ĝin al aliu. Ne estu egoisto, oĉjo !!!





## ĈU VERE LA KONGRESEJOMPOR LA "UNIVERSALA"ONI EKKONSTRUOS ĈI-JARE???????

En 1986 "Sevilla" enhavos sporthalon. Ĉi-olda revo de multaj sevilaj sportamatoroj fariĝos realiĝon la sevilja urbodomo. Tial, nia urbo disponos je subtegmenta sportmuntaĝo tiom granda kiel tiuj de aliaj urboj hispanaj, nome: Madrid, Valencia, Zaragoza, La Coruña, San Sebastián kaj Oviedo.

ĈE KVARTALO "POLIGONO DE SAN PABLO".

La elektita situo por la sporthalo estas en "Polígono S. Pablo", apud la autoŝoseo,kio ne ebligas trafik-problemojn dank'al tiea vojretaro.

Alia positiva aspekto rilatas la loĝantar-densecon en tiu zono ,kio ebligos la eblecon sporti sen troa foriro al tieanoj.

Pri sportbranĉoj praktikotaj nur diri ,ke ĉiaj sporthalaj eblas, t.e. sportgimnastiko, hokeo, korb-, man- kaj flug-pilko, halterlevo,ktp.

Alie, elstaras atletiko,ĉar projekto antaŭvidas 200-an ŝnurmetran kurejon ,kio nur samiĝas amplekse enlande al tiu de San Sebastián aliflanke plej kvalita en Eŭropo.

Dank'al tiu subtegmenta kurejo Seviljo sumiĝos kun nemultaj aliaj eŭropaj urboj pri tiaskala porsporta konstruaĵo kaj sekve ankaŭ la ebleco de altrangaj turniroj.


Krome la poratletika muntaro enhavos centran rekton por 60-a eben-kaj barier-kuroj, taŭgejoj por ĉiaj saltoj kaj pezlanĉado.

PLURUZAJ EBLECOJ.

Indas klarigi ,ke malgraŭ ,ke oni ne povas disvolvigi ĉiajn sportojn samtempe tamen enhaveblas 3 korbopilkejojn aŭ 2 manpilkejojn, plie eblas sporti en apuda loko grundgimnastikon aŭ luktarton aŭ halterlevadon.

Pri la planko muntota: ebligos samtempe atletikon kaj ceterajn sportojn ĉar ĝi ebenas kaj senŝrumpas

Memkompreneblas ,ke la koncerna materialo ankaŭ estos en previzo, nome: golejoj, korbotabeloj, matracoj, ktp.



JEN VI POVAS VIDI BIRDOVIDE LA TRI KORBOPILKEJOJN ENHAVEBLAJN TIE EN LA SPORTEJO

daŭrigota.

la krom-sportaŭ projektoj; scenejon etendeblaŭkies rezulto estos povi aranĝi kulturokazontaĵojn muzikajn, teatrajn kaj cetere.

Dum dua fazo 2 novajn konstruaĵojn oni faros. Tie estos e ne gimnastikejo kaj subtegmenta naĝejo 25 X 12,5 metroajn amplekse.

FINANCO KAJ CETERO.


Ĉi-projekta budĝeto estos je 690 peset-milionoj, nombre: ĉefparton donos la urbodomo, 50 milionojn de la "Andaluzia Konsilantaro" en 1984 plus samkvanto en 1985.

Kiel dirite, la finiĝo de l'sporthalo estos en 1986, temen la ekmasona dato tute ne estas konata pro prilokaj problemoj.

Ĉefa afero ankoraŭ klariĝendas: la spektantnombro, kio dependas de l'evento okazonta, de se atletiko: 3.500 sur fiksita ŝtupbenkoj, se kultur-evento: ĝis 10.000 per suplementaj sidlokoj.

Fine restas diri, ke jam delonge necesis sporthalo kaj ĝin havos jae Seviljo. Sekve, tre taŭgos la sportejo ne nur por trejnado sed ankaŭ por ne plu ni rezigni celebri altrangajn kompeticiojn.

Kand I. Dato
esperantigita de la revuo "Sevilla"
far A. Rguez. G.




ABONU «ĈIESREVUINO»-n:
JARA ABONO=200 pes.
(aŭ 4 internaciaj respondkuponoj validaj)
«4 NUMEROJ 4»
str. Pozo, 3 41003-SEVILLA
HISPANIO (aŭ España).




...KAJ L'MONDO MALAPERIS.
de Pablo Parrilla
HA! ANKORAŬ MI NE VIDIS ĈI KOMIKSVENDEJON EN ĈI TIU KVARTALO!
DONU AL MI "ĈIESREVUINO"-n, BONVOLE!
KIEL BELE ILI VERKAS! KIAJ KOMIKSOJ!!!
CIENCO FIKCIO
EJ!!! ESTAS MI MEM SUR LA BILDO, LEGANTA REVUON!!!
!?


Hmm! La revuo ekinteresiĝas. Mi legu, mi legu plu!
FIKCIO-SCIENCO
MALFELIĈE, ĈIAM ĈIUJ FINIĜAS SAME.
DOMAĜE!
BUM!
...KAJ LA MONDO MALAPERIS.
FINO
EJ! HE! OJ! VE, HO! KIO, DO! HA!
DIABLE!!!
FINO

PLORO PRO LA MORTO DE IGNACIO SÁNCHEZ MEJÍAS
LLANTO POR LA MUERTE DE IGNACIO SÁNCHEZ MEJÍAS DE F. García Lorca

## LA KORNOBATO KAJ LA MORTO

Je la kvina de l'vespero.
Estis la kvina ĝuste de l'vespero.
Infano alportis littukon blankan
je la kvina de l'vespero.
Unu korbo de kalk'antaŭvidita
je la kvina de l'vespero.
La ceter'estis morto, nure morto
je la kvina de l'vespero.

La vent'kotonlarugojn ja kunportis
je la kvina de l'vespero.
Kristalon kaj nikelon semis l'oksido
je la kvina de l'vespero.
Batalas jam kolombo kun leopardo
je la kvina de l'vespero.
Femuro kun la korno korpremega
je la kvina del vespero.
Komendiĝis la sonado del'bordun'
je la kvina de l'vespero.
Arsenikaj la kloŝoj kaj la fumo
je la kvina de l'vespero.
Homaj silentaj aroj stratangule
je la kvina de l'vespero.
Kaj l'sola taŭro ja en la supra koro!
je la kvina de l'vespero.
Kiam la neĝa svito ekalvenis
je la kvina de l'vespero,
kiam la taŭrluktejo tutjodiĝis
je la kvina de l'vespero,
la mort'demetis ovojn en la vundon
je la kvina de l'vespero.
Je la kvina de l'vespero.
Je la kvina ĝuste de l'vespero.

Ĉerko kun radoj estas ja la lito
je la kvina de l'vespero.
Liaorele flutoj kaj ostoj sonas
je la kvina de l'vespero.
La taŭro muĝis jam tra l'ia frunto
je la kvina de l'vespero.
La ĉambro irizatas d'agonio
je la kvina de l'vespero.
Malproksime jam venas la gangreno
je la kvina de l'vespero.
Rostro d'irido tra l'ingvenoj verdaj
je la kvina de l'vespero.
Kiel sunoj bruliĝis ja la vundoj
je la kvina de l'vespero,
kaj fenestrojn rompadis homamaso
je la kvina de l'vespero.
Je la kvina de l'vespero.
Ve, kiel kvin-terura de l'vespero!
Ĉiuj horloĝoj montris ja la kvinan!
Montris la kvina ombre de l'vespero!

## LA COGIDA Y LA MUERTE

A las cinco de la tarde.
Eran las cinco en punto de la tarde.
Un niño trajo la blanca sábana
a las cinco de la tarde.
Una espuerta de cal ya prevenida
a las cinco de la tarde.
Lo demás era muerte y sólo muerte
a las cinco de la tarde.

El viento se llevó los algodones
a las cinco de la tarde.
Y el óxido sembró cristal y níquel
a las cinco de la tarde.
Ya luchan la paloma y el leopardo
a las cinco de la tarde.
Y un muslo con un asta desolada
a las cinco de la tarde.
Comenzaron los sones del bordón
a las cinco de la tarde.
Las campanas de arsénico y el humo
a las cinco de la tarde.
En las esquinas grupos de silencio
a las cinco de la tarde.
!Y el toro solo corazón arriba!
a las cinco de la tarde.
Cuando el sudor de nieve fue llegando
a las cinco de la tarde,
cuando la plaza se cubrió de yodo
a las cinco de la tarde,
la muerte puso huevos en la herida
a las cinco de la tarde.
A las cinco de la tarde.
A las cinco en punto de la tarde.

Un ataúd con ruedas es la cama
a las cinco de la tarde.
Huesos y flautas suenan en su oído
a las cinco de la tarde.
El toro ya mugía por su frente
a las cinco de la tarde.
El cuarto se irisaba de agonía
a las cinco de la tarde.
A lo lejos ya viene la gangrena
a las cinco de la tarde.
Trompa de lirio por las verdes ingles
a las cinco de la tarde.
Las heridas quemaban como soles
a las cinco de la tarde,
Y el gentío rompía las ventanas
a las cinco de la tarde.
A las cinco de la tarde.
!Ay qué terribles cinco de la tarde!
!Eran las cinco en todos los relojes!
!Eran las cinco en sombra de la tarde!

Tradukis: KOLEKTIVO MI.





## BRILDORM'

Sonsun'
    sunson'
La sun'
    kaj la son:
Lumdun'
    dunlum'
La dun'
    kaj la lum:
Sonlun'
    lunson'
La lun'
    kaj la son:

Sundorm'
    dormsun'
La dorm'
    kaj la sun:
Dormdun'
    dundorm'
La dun'
    kaj la dorm:
Lunlum'
    lumlun'
La lum'
    kaj la lun:

Sunlun'
    lunsun'
La lun'
    kaj la sun:
Dormlum'
    lumdorm'
La lum'
    kaj la dorm:

Dormu mia lun'
    mia am'
        sun:

KOLEKTIVO MI

## AL GALILEO

Antaŭjarcente, vi scias,

La malhelaĉo estis leĝ'.

Mastris bonon kaj malbonon

La religio, la novec'.

Tie estis mi,

Falis en malfeliĉon

Pro inkvizici'.

Diri ne volis mi

Ne al scienco, jes al konfuz'.

Ne 'stas misteroj.

Pro la obsed' de la sci'

Volis serĉi veron mi.

Sed ne atingis konvinki,

Ne estis loko por la rezon'.

Mi ne kredas je di',

La sango fluas nur de la kor'.

Ne 'stas misteroj!

Ĉio moviĝas,

La tero turniĝas ĉirkaŭ sia sun:

Novaj elpensoj

Irigas al mond'je la dispeciĝ'.

Mi ne kredas je di',

Ne 'stas misteroj !!

P= V= P.

KOLEKTIVO MI

Tradukis



## SIMPLAĴO

Unu , ruĝ' , tri
Kvar , nigr', ses
Sep , o , naŭ
Dek , i , verd'

Blank', e , du
Kvin , a , flav';
Ok , u , blu'.

Iks' , fajr', nul' ;
Ter' , akv' , sun'.

NUR NI DU

KOLEKTIVO MI



OK8







HISTORIO DE APENDICO
NU, SRO PAŬLO, FARU VI SURTRANĈON!
RASSSSSSSS!
NJAK!!
EJ!?!
SED, ĈU VI NE DIABLE SCIAS KIE SIDAS L'APENDICO? TRANĈU TRAFE!!!
HO VE! ĈI STUDOBJEKTON LI MIN FIASKIGOS!
RASSSSSSSSSSSSSSSSSSSSS!!!
NE TIEL GRANDA! VI ĴUS TRANĈIS DE LI ĈUROVON!!
SED, ĈU NENIU SCIAS KIO ESTAS L'APENDICO?
ĈU VEJNO?
ĈU TIO ĜI?
EH... NU... ĈU ĈI BUSO HALTIĜAS ĈE L'KATEDRALO?


SED KIA FUŜISTO ANESTEZIS ĈI POVRULON?
NU BONE, OKAZIS, KE NI DISPONAS NUR JE ĈI VINAĈBOTELO...
IMBECILO, ARANĜU L'AFERON KIEL AJN!!!!
DO, NE REZULTIS TUTE FUŜE.
VIDU, EĈ RESTIS BELE...
KO...KRI... DOJ....
FIN





## VOJAĜO DE LA PAPO AL SOVETUNIO

VATIKANURBO. EŬROPA STRESS.
JAM ESTAS PRETAJ LA PREPARAĴOJ POR LA VOJAĜO DE LA PLEJSUPERA PONTIFICO AL SOVETLANDO. LA AVIADILO FLUGOS AL MOSKOVO, KIE POST INTERŜANĜOJ DE OPINIOJ KUN LA ESTROJ DE LA PLEJ SUPERA SOVETO, ĜI FLUGOS AL KIEVO. TIE, INVESTIGACIA TEAMO ZORGOS PRI LA KOSMOVOJAĜA TREJNADO AL KIU JOHANO PAŬLO II-A ESTOS SUBMETATA.



MONDA PRIMICO: LA VERA POMO DE NEWTON.







VIRINO: Ĉu vi ne estas Kontenta pri via laboro? VENU AL SEVILO POR ESTI PUTINO JE LA ALAMEDO!!! BONAJ PENISOJ (KAJ LONGAJ), BONAJ ĈURADOJ (SED MALMULTE D'ARĜENTO). SKRIBU AL:
PUTINA ASOCIO TUTMONDA.
PUTSTRAßE, 3 41002,9 ZEV.








# DIO EKZISTAS



La lastaj sovetaj investigacioj tiel tion konfirmas:




TAĈMENTO FORMITA DE LA 14 PLEJ GRAVAJ INVESTIGACIISTOJ DE SOVETUNIO DESTINITAJ AL LA KOSMONAŬTIKA INVESTIGA CENTRO DE UKRANIO TRAFIS SOLVI POST 15 LONGAJ MONATOJ DE DISKUTADO LA LEGENDAN KAJ ENIGMAN FENOMENON KONITAN INTERNACIE KIEL "DIO". TEMAS PRI ESTAĴO ĈIOPOVANTA KUN DIAMETRO DE PROKSIMUMA MEZURO DE 600.000 LUMJAROJ KAJ LOKITA INTER LA KONSTELACIOJ DE LA PLEJ GRANDA URSINO KAJ TIU DE PEGASO.

"KIAM MI VIDIS ĜIN TRA MIA LENSO DE MIA TELESKOPO, MI SENTIĜIS PLENA JE PACAJ KAJ BONECAJ SENSACOJ KIUJN MI ĜIS TIAM NENIAM KONIS" – DEKLARIS AL LA INFORMISTOJ ALEKSEJ KERENSKI, NOBELPREMIITO DE FIZIKO EN 1976. ŜAJNAS, KE ĜIS LA NUNA DATO NI NE KONAS IAN SIGNON PRI LA SUPOZEBLA EKZISTO DE LA SANKTA SPIRITO, ONI TAMEN NE FORPELAS TIUN EBLECON PRO LA PROKSIMAJ RILATOJ INTER AMBAŬ METAFIZIKAJ FENOMENOJ.



## MALSUKCESITA ELŜIPIĜO EN ODESSA.



LA PORTUGAL-HISPANA ŜIPARO, KIU FORIRIS ANTAŬ IOM DA SEMAJNOJ DE LA KARTAGENA HAVENO KUN ARO DE FREGATOJ, KURIERŜIPOJ, 4 AMUZJAĤTOJ, LA HELIKOPTERPORTEJO "DEDALO", IOM DA ŜIPKNABOJ KAJ 500 AŬ 600 GENERALOJ, PRETA POR REVERDIGI ANTIKVAJN LAŬROJN KAJ INVADI SOVETUJON SINKIS TUTE ĈE LA BORDO DE ESPALDORS, INSULETO PROKSIMA AL IBIZO. "NI PENSIS, KE ĈI TIU ESTAS LA ĜUSTA VOJO" – DEKLARIS LA ADMIRALO PINHEIRO EN PACHA' FESTE – "KROME, ANKAŬ NI NE VENIS LUKTI KONTRAŬ LA ELEMENTOJ".

## LA PATRINO DE REAGAN DEKLARAS: "MIA FILO ESTAS IDIOTO"


LA PATRINO DE LA PREZIDANTO REAGAN, GRAVE MALSANA, NE VOLIS KUNPORTI AL SIA TOMBO SIAN SEKRETON KAJ FARIS JENAJN SURPRIZAJN DEKLAROJN: "JES, SINJOROJ, MIA ETA RONNY ESTAS IDIOTO. MI TION SCIAS DE LA MOMENTO DE MIA NASKO DE LI. "ĈARLY – DIRIS MI AL MIA EDZO POST LA PLENUMO DE LA KOITO –, EL ĈI TIU FUŜA ĈURADO POVAS REZULTI NENIO BONA". KAJ TIEL ESTIS, KIAM LI 12-JARIĜIS NI PORTIS LIN ĈE PSIKIATRO ĈAR LI ANKORAŬ PISIS LITE (KUTIMO KIUN LI ANKORAŬ KONSERVAS). LA DOKTORO DIRIS AL NI, KE TIU FUŜKREAĴO TAŬGIS NUR POR MUZIKKRITIKISTO, ESPERANTISTO, AŬ PREZIDANTO DE NIA GRANDA NACIO. "POSTE LI DIRIS NIN, KE LI VOLAS ESTI AKTORO. TIU RONNY, JAM SESDEKJARA KAJ ANKORAŬ ŜERCEMA. SE NI SCIINTUS KE LI SERIOZ PAROLIS, NI NE PERMESINTUS TION AL LI!"

## MANIFESTO DE LA ANDALUZIA KONTRAŬPERFORTA KUNVENO.

Nia revuo parolis kun membro de la **A.K.K.** (Andaluzia Kontraŭperforta Kunveno) por koni la opiniojn de lia grupo pri la leĝo kiu starigos la konscian militrifuzon. Ni donas sekve liajn vortojn.

"Kiam nia lando alfrontas problemojn tiel gravajn kiel la senlaboreco, kaj kiam ĉi tiu realeco estas vivata kun pli da krudeco en Andaluzio, estas malfacile peti de la popolo ĝian atenton pri la graveco de la proklamo de leĝo, kiu sendube koncernos preskaŭ 10.000 junulojn. Aliflanke, la nuntempa konkurenco de armiloj devigas ellaboron de militaj kostotaksoj ĉiufoje pli grandaj. La socialisma registaro, malgraŭ sia prebalotada promeso, anstataŭ renversigi tiun evoluon, realigas armilan politikon, kiu supozas veran imposton por la laboristoj. Tiel, dum oni destinas 3.000 milionoj de pesetoj ĉiutage por militaj elspezoj, la cifero de senlaboruloj superas 2,5 milionojn kaj la nombro de analfabetoj preskaŭ atingas la milionon. Krome la porsanecaj kaj loĝeblecaj necesoj estas multfoje skandalaj.

La AKK konsideras, ke la lukto pro la Paco postulas konsiderindan kuraĝon de ĉiuj kiuj ne rezignas esti simplaj spektantoj de la milita frenezo kiu ĉirkaŭvolvas nin, subtenita kompreneble unuflanke de la ekonomia apogo kaj ideologia de kelkaj sektoroj, kaj aliflanke de la kunlaborado rekta kaj nevolonta de la plejmulto el la civitano, kiuj ebligas, ke la milita povo ĉiutage havos plimultan invadon kaj premon super la civilaj povoj. Rilate al la leĝo (ĵus aprobita), la kontraŭperfortuloj andaluziaj manifestas sian malakcepton kontraŭ ĝi pro l'sekvantaj kialoj:



-La leĝo ne tute akceptas kiel veran la rajton kiun ĝi pretendas reguli.

-La militrifuzo ne povas esti uzata de ĉiu persono nek ĉiumomente, ĉar ĝi nek akceptas ĉiajn kialojn por konscie rifuzi nek la rajton deklariĝi militrifuzanto dum la porarmea junulservo

-La leĝo akceptas la ekziston de tribunalo kiu decidas arbitre kiu estas aŭ ne estas militrifuzanto.

-La substitua servo organiziĝas surbaze de disciplino, hierarkio, blinda obeo... kaj eble la miltrifuzantoj konvertos sin en malkarajn laboristojn por la ŝtato.



-La leĝo ne akceptas la militrifuzon dum la milito, escepte kiel kontinuon kaj plifortigon de la porarmea aktiveco.


-La leĝo forgesas la eblecojn realigi servon por la Paco.

-Oni punas severe la uzon de la militrifuzon , ĉar oni postulas de ni plilonga olen la porarmea servo resti en la substitua servo.

Aprobite la leĝo de la nuntempa registaro, la membroj de AKK estas devigitaj rifuzi ĝin pro la montritaj kialoj.



Mi dankas pri la lando kiu akceptas honore al gravaj krimuloj kaj al la etaj traktas pune.



EL AMIGO AMERICANO.

LOS MAESTROS DE LA GUERRA.

PERSHING IS MY LADY.

Ofensivo Creativo

# BONVENON PAĈJO !!!